

En tiu ĉi numero, legu pri:

9-a TAKE diversflanke:

- Daŭripovo en la centro
- La kongresa temo, analizoj kaj debatoj
- Riĉenhava programo

Diversaj agadoj fine de 2017

## 9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto: daŭripovo en la centro

Maritza Gutiérrez González

De la 11-a ĝis la 17-a de februaro okazis la 9-a TAKE kiu arigis en la hotelo Panamericano, situanta en la orienta parto de Havano, entute 231 kongresanojn el 19 landoj el kiuj 173 estis kubanoj kaj 15 el Ameriko. Aliaj kongresanoj venis el Azio kaj Eŭropo. La amerikaj kongresanoj venis el Brazilo, Kanado, Kolombio, Meksiko, Nikaragvo kaj Usono.

Resumi la kongresan semajnon estas tre malfacila tasko, des pli en mallonga artikolo, tamen, indas almenaŭ revui ĝin ĉar laŭ opinioj de multaj kubaj kaj eksterlandaj gastoj, ĝi estis bone organizita kaj bunte aranĝita por kontentigi kiel eble plej multajn interesojn.

La tutamerika kongreso proponis al la esperantistoj riĉan programon laŭ la gusto de UK en malgranda formato. Unue ni sukcesis aranĝi tute decan kongresan libron per la sperta kaj serioza laboro de Alberto Fernández-Calienes Barrios kaj Juan Ramón Rodríguez Gómez kun la kontribuo de Pedro Fernández Rodríguez. Kongresa sako tute profesia estis aranĝita por la kongresanoj samkiel kongresa nomŝildo. La laborsesioj okazis samtempe en tri salonoj de la kongresejo. La salonoj havis kiel



tradicie la nomon de elstaraj esperantistoj, nome Zamenhof, Ledon omaĝe al gesinjoroj Symilde kaj Gilbert Ledon el Brazilo; kaj la tria estis Lamas, honore al kuba esperantisto, Honora Membro de UEA kaj KEA.

La 7-an de februaro okazis gazetara konferenco en la Halo Junularo de Pabellón Cuba, en la moderna urbocentro, kun ĉeesto de pluraj ĵurnalistoj kaj aparte de la televidkanalo Cubavisión Internacional, kiu prezentis intervjuon kun Ariadna García Gutiérrez, respondeculino pri la kongresa ga-

zetara servo. Indas menci ke ĝi estis dividita kun aliaj gastoj, ne esperantistoj, kadre de la Internacia Librofiro, kie ankaŭ Esperanto ĉeestis tre aktive. Informkampanjo komenciĝis antaŭkongrese kaj sukcese daŭris tutsemajne. La nacia informsystemo televida filmis la inaŭguron kaj fermon de la kongreso kaj kongresanoj estis intervjuitaj por la radio kaj televido, tre speciale por la vesperaj novaĵservoj tre spektataj tutlande.

La Solena Inaŭguro de la kongreso okazis en la teatro de la Nacia Belarta Muzeo kaj ĝin partoprenis la Alta Protektanto, vicministro pri kulturo, Fernando Rojas, kiu bonvenigis la kongresanojn. La solenaĵon ĉeestis nome de UEA, d-ino Sara Spanò, estrarano pri kongresoj kaj ankaŭ Francesco Maurelli, TEJO-vicprezidanto, kiuj salutis la kongresanojn kaj transdonis inspiroplenajn mesaĝojn. Kiel parto de la malferma ceremonio, ni omaĝis la kuban aktorinon Georgina Almanza Lanz, rekonata kiel elstara figuro de la kuba kulturo; ŝi estis elektita Honora Membro de KEA kaj entuziasme kontribuis dum multaj jaroj al Esperanto en Kubo.

La Interkonan Vesperon malfermis la kongresa kanto "TAKE-TAKE" de Fratoj El, komponita de Jaime Ginarte Díaz. La kanzono estis uzita por te-

*Daŭrigu sur p. 2*



Grupa foto de la partoprenintoj de la 9-a TAKE en la ĉefenirejo de la Nacia Belarta Muzeo, en kies teatro okazis la Solena Inaŭguro kun ĉeesto de la Alta Protektanto, gastoj de diversaj kulturaj institucioj kaj Amikoj de Esperanto. Fotoj dum la 9-a TAKE en tiu ĉi numero: Ana Laura González Collazo.





Maritza Gutiérrez González, prezidantino de KEA kaj de la LKK, alparolas la kongresanojn dum la Solena Fermo de la 9-a TAKE.

levida reklamo aranĝita pere de la kuba Ministerio de Kulturo kaj KEA kunlabore kun geesperantistoj havanaj Roberto Núñez Silva kaj Digna Morales Burón.

La ĉeftemo de la kongreso “Lingvoj kaj kulturoj: edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj”, tutcentre proponis rigardon al lingvoj kiel portantoj de kulturo, kaj al edukado kiel bazo por transdoni al niaj nunaj kaj estontaj generacioj, garantion pri estonteco en kiu la mediaj, sociaj kaj ekonomiaj konsideroj estu en ekvilibro cele al evoluo kaj bona vivkvalito. Ĝi havis entute kvar sesiojn, kie oni povis diskuti pri kio estas daŭripova evoluo? Kiel eduki infanojn kaj gejunulojn por daŭripova evoluo? Kiel rolas la lingvo en la edukaj procezoj? Oni interŝanĝis informojn kaj spertojn pri la lingva situacio en Ameriko kaj aparte pri indiĝenaj lingvoj, kaj kiel ni povas kontribui per la lingvo Esperanto al daŭripova edukado.

Ni povas raporti ke dum la kongresa semajno okazis 14 prelegoj, 12 prezentoj, ekumena diservo, 7 atelieroj pri instruado, origamio, danco kaj kanto; 2 kvizoj, 5 fakaj kunsidoj interalie, pri ĝemelaj urboj, Monda Asembleo Socia (MAS) kaj radioamatoroj; 2 filmoprezentoj, 3 libroprezentoj, nome la libro hispanlingva *El Esperanto en Cuba*, verkita de Juan R. Rodríguez Gómez; José Martí: *De kie kreskas la palmo*, de Maritza Gutiérrez González kaj *Teo kaj Amo, Rakonto pri Teo*, redaktita de Zhang Ping (Ĝoja) kiu tre afable sendigis ĝin per Georgo Handzlik.

Aliaj programeroj estis la prezento de 2 kubaj teatraĵoj, nome *Franciska kaj la Morto* kaj *Emelina Cundiamor*, elstaraj verkoj de la kuba teatro; okazis 5 konversaciaj rondoj, 2 forumoj: Konsciigo-Kapablo kaj Junularo; AMO-Seminario, ILEI-kunsido kaj ILEI-ekzamenoj sukcesaj, nome 10 esperantistoj trapasis la mezan nivelon.

La artaj vesperoj estis 6 entute, nome Interkona Vespero, E-kabaredo, Nacia Vespero kiu ebligis al la kongresanoj ĝui profesion dancensemblon Retazos de Isabel Bustos en teatro de la malnova urbo-

centro; krome okazis teatra vespero de Verda Banano per kiu la aktoroj Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik regalis la teatraĵon *La kredito* en la teatro Raquel Revuelta situanta en la moderna urbocentro. Ankaŭ okazis Internacia Arta Vespero kiu donis okazon al kubaj kaj eksterlandaj gastoj prezenti sian arton, kaj la Adiaŭna Festo, kie sin prezentis la profesia ensemblo de alternativa muziko Kialo kaj la kuba esperantista ensemblo Amindaj, el Contra-maestre, Santiago de Kubo, kiu fermis la vesperan programon per bela kaj danciga koncerto.

La kongresa programo inkluzivis filatelan ekspozicion en la Poŝta Muzeo de Havano; matenajn sesiojn de ĉinaj ekzercoj, nome, ĉigongo por la sano; plus sesiojn de tabulludoj.

Rilate al la ekskursiva programo oni devas menci la antaŭkongresan ekskurson al la bela Valo Viña-

les en la okcidento de la insulo; dum la semajno okazis 5 duontagaj ekskursoj, merkrede okazis 2 tuttagaj ekskursoj kaj postkongreso al la centrosudo de Kubo, kiu inkluzivis vizitojn al la urboj Cienfuegos, Trinidad, Sancti Spíritus kaj Santa Clara, ĉiuj ĉiĉeronitaj de esperantistoj (vd. statistikon en la centraj paĝoj).

Spite al tio ke ne eblas ĉion diri pri la 9-a TAKE en malmultaj vortoj, mi povas raporti ke ĝi estis unika en la senco ke ĝi donis la ŝancon al multaj kubaj esperantistoj kaj eĉ al kelkaj amerikaj gastoj, ĝui tutan semajnon en Esperanta etoso, lerni, kundividi spertojn kaj revojn, utiligi la lingvon por interkulturaj travivaĵoj.

Oni ne povas diri ke la amerika movado rolis centre dum la kongresa semajno ĉar evidentiĝis, ke malmultaj amerikanoj povas vojaĝi al eksterlando, kio sendube konsistigas obstaklon kaj defion por niaj respektivaj landaj movadoj kaj regiona agado entute. Tamen, dum la debatoj de la kongresa temo niaj rigardoj kaj analizoj ja fokusiĝis al nia regiono kaj solidaremo estis sento kiu disfloris tra la tuta kongresejo, kaj ne nur!

Alia tre pozitiva eĥo ja sekvis, ĉar la kongreso multe videbligis Esperanton en Kubo kaj renovigis la interesiĝon pri la lingvo, tiel ke pluraj kubanoj ĵus aliĝis al novaj kursoj; cetere, la junularo ankaŭ havis sian spacon kaj povis multe interŝanĝi kun aliaj samaĝuloj el la tuta lando kaj aparte el Usono.

En tiu kunteksto, la Tutamerika Kongreso sukcesis, ĉar unuavice ĝi kunvenigis esperantistojn de la regiono kaj de aliaj mondopartoj por interŝanĝi spertojn, lerni, instrui, dialogi. Tamen, mi ŝatus insisti pri tio ke, sendepende de decidoj aŭ rezolucioj, kiuj gravas por aliaj neesperantaj kongresoj, la sukceso de nia kongreso estis pruvi la vivantecon de Esperanto kiu rezultas el la viva uzado, el la vigla kaj natura interparolo inter homoj de diversaj nacioj, landoj kaj kulturoj.

El: *Esperanto*, n-ro 1323(4),  
aprilo 2018, p. 84-86



Dum la lasta sesio, oni rekonis la laboron de LKK-anoj, helpantoj kaj aktivuloj, danke al kies entuziasmo la kongreso estis sukcesa.





Maritza Gutiérrez González gvidis debatojn pri la kongresa temo kun aktiva partopreno de Ariadna García Gutiérrez.

## La kongresa temo: analizoj kaj debatoj

La kongresa temo de la 9-a Tutamerika Kongreso de Esperanto havis entute kvar sesiojn.

Unue okazis enkonduka prezento dimanĉe la 11-an de februaro. Tri demandoj estis starigitaj por pridiskuto en la dua sesio.

- Kio estas daŭripova evoluo?
- Kiel eduki infanojn kaj gejunulojn por daŭripova evoluo?
- Kiel rolas la lingvo en la edukaj procezoj?

En la dua sesio de la kongresa temo okazinta en lundo la 12-an de februaro, oni diskutis la demandojn en tri subgrupoj, kiuj interŝanĝis argumentojn kaj prezentis raportojn pri siaj diskutoj, kiuj ĉefe rilatis al la nuntempaj problemoj pri la edukado de infanoj.

Oni konstatis, ke tra la tuta mondo ekzistas similaj problemoj kaj defioj pri protektado de infanoj, pro la abundo de perforto en la amaskomunikiloj, interreto, la situacio en lernejoj kaj edukado hejma; oni esprimis zorgojn pri kiel protekti la naturon; pri nebonaj kondutoj tiurilate; kaj en la tria demando oni skizis la esencan rolon de lingvoj en la edukaj procezoj.

Du pliaj demandoj estis starigitaj por pridiskuto en la tria sesio:

- Kion vi scias pri la lingva situacio en Ameriko kaj aparte pri indiĝenaj lingvoj?
- Kiel ni esperantistoj povas kontribui per la lingvo Esperanto al daŭripova edukado?

En la tria sesio okazinta en mardo la 13-an de februaro, la kongresanoj laboris grupe kaj raportis pri la situacio en Kanado kaj Mezameriko, kaj oni ankaŭ debatis pri la situacio en Kubo kaj la lingva heredaĵo de la indiĝenaj praloĝantoj.

Oni raportis pri projektoj en Amazonio koncerne protektadon de aŭtoktonaj lingvoj kaj ankaŭ pri la bezono ke la movado engaĝu sin en konkretajn projektojn de la lokaj komunumoj por protekti la medion, arboplantadon; ligi sin al tiuj grupoj kiuj prezentas bonan ŝancon por kunhelpi ke infanoj, gejunuloj kaj ties gepatroj estu edukataj konsidere al la bezonoj de la homoj kaj la naturo.

Ni povas resumi, ke la sesioj de la kongresa temo estis tre fruktodonaj kaj ilin partoprenis entute cento da kongresanoj kiuj povis akiri pli da scioj pri la temo.



La debatoj pri la kongresa temo altiris la atenton de la kongresanoj, kiuj plejparte partoprenis la kvar laborsesiojn.

Kvankam la kongreso ne rezoluciiis pri la demando starigita de la kongresa temo, ni skizis Principan Deklaron, por renovigi la sintenon de la Esperantomovado pri la temo, kiu konfirmas la bezonon ke la Esperanto-komunumo pli proksimiĝu al la nuntempaj demandoj starigitaj en la Tagordo 2030 de Unesko.

Pri tiu ĉi temo KEA havas apartan intereson labori cele al tio ke niaj membroj kaj aktivuloj sentu ke nia Esperantujo estas vera edukejo.

- Ke nia edukejo, unue celas disvastigi Esperanton kaj la konscion pri la valoroj de la lingvo kiel kultura trezoro por defendo de la gepatra lingvo;
- Ke nia laboro ankaŭ celas la lingvan justicon, kiu kontribuu al lingva ekvilibro, kies sekvoj bone efikas al konservado de diverseco de kulturoj kaj mondovizioj, ĉar tia diverseco garantias pli bonan kaj kvalitan vivon por la sano de nia planedo. Tiuj estas edukaj bazoj por survoji al daŭrigebla evoluo, kiu kontentigu la bezonojn de la nunaj kaj estontaj generacioj.

Kiel ni povas efike kontribui?

La respondo kuŝas en la ĉiutagaj agoj kiujn ni povas entrepreni ene de niaj koncernaj komunumoj, provizante spacon por eduki unue nin mem cele al nova pensmaniero.

Ni vivas en unika planedo kaj ĝuas la privilegion posedi lingvon kiu estas efike uzata por koni aliajn homojn, konstrui amikecon, dialogi surbaze de respekto al la homo kaj ties lingvo, kio estas ankaŭ respekti la kulturon de la aliaj, kaj kune kontribui purigi nian medion, protekti niajn arbarojn, la marojn kaj riverojn, nian komunan domon, nian terglobon.

Ĉiu eta paŝo al tiu celo estas ja tre pozitiva paŝo.

Maritza Gutiérrez González





## La 9-a statistike:

Aliĝis 244 kongresanoj el 20 landoj kaj partoprenis 231 el 19 landoj, el ili 7 el Ameriko: Brazilo, Kanado, Kolombio, Kubo, Meksiko, Nikaragvo kaj Usono.

La ampleksa programo, krom 4 sesioj pri la kongresa temo konsistis el:

- 14 prelegoj pri: Ĉigongo por la sano, historio de Esperanto en Santiago de Cuba, germana sansistemo, korea ginsengo, la gvajabero, la moderniga projekto de José Martí pri Latinameriko, latinamerika vortaro, metodologio por instrui-lerni Esperanton, perletera interŝanĝo, projekto Amindaj, radioamatorismo, terminologio, Yumeiho-terapio kaj varbado por Esperanto en Ĉikago
- 12 prezentoj pri: Amindaj-filmoj, Esperanto en Radio Havano Kubo, Kuba folkloro muziko, Kubo (ĝenerale), Martí-klubo, Monda Asembleo Socia (MAS), radioamatoroj, santerio, SAT, tajĝiĉuano, TEJO kaj UEA
- Ekumena diservo
- 7 ateleroj pri: danco, instruado, kanto, origamio kaj tradukado
- 5 fakaj kunsidoj pri ĝemelaj urboj, junularo, literaturo, radioamatoroj kaj ILEI
- 2 filmoprezentoj
- 3 libroprezentoj: *El Esperanto en Cuba, De kie kreskas la palmo kaj Teo kaj amo...*
- 2 kubaj teatraĵoj: *Emelina Cundiamor kaj Franciska kaj la morto*





## Riĉenhava programo

- 2 sesioj de tablo- aŭ tabulludoj
- 5 konversaciaj rondoj
- 2 forumoj: Konsciigo-Kapabligo kaj Junularo
- Aŭkcio
- AMO-seminario kun 6 temoj
- 2 kvizoj
- ILEI-ekzamenoj (meza nivelo): 10 personoj prezentiĝis kaj ĉiuj sukcesis
- Filatela ekspozicio
- artaj vesperoj: kronologie, interkona, Esperanto-kabaredo, Nacia (ne kiel planite, sed bonkvalita spektaklo), internacia, teatra kaj adiaŭa festo

La kongresanoj partoprenis en kelkaj ekskursoj:

- Antaŭkongresa: Valo Viñales
- 5 duontagaj: Dao de la vojaĝanto ene de la ĉina novluna kalendaro, Ekriĝardo al la universo de la oriŝoj, Havano trarigarde (2), Laŭ la vojo de Hemingway

Kaj ĝuste tuj post la fino de la solena fermo, komenciĝis la postkongresa ekskurso, tra 5 urboj (kronologie): Cienfuegos, Trinidad, Sancti Spíritus, Santa Clara kaj Havano

Laŭlanda statistiko de partoprenintoj: Belgio 1, Brazilo 1, Britio 1, Finnlando 1, Francio 6, Germanio 7, Hispanio 4, Italio 3, Japanio 2, Kanado 2, Kolombio 2, Korea Respubliko 6, Kubo 173, Meksiko 2, Nikaragvo 1, Pollando 4, Serbio 4, Svislando 1, Usono 7.

Juan Ramón Rodríguez Gómez







## Fine de 2017:

### Koncerto de ĴeLe en Havano

La pasintan 4-an de novembro 2017 koncertis en la Esperanto-Centro Havano la familia muzikduopo ĴeLe, el Germanio, kun Geomar kiel gasto. ĴeLe: Ĵenja kaj Lena (filino kaj patrino) ekestis en la jaro 2009 kaj ekde tiam ili sin prezentas en internaciaj eventoj. Ili registris ĝis nun 4 albumojn: “Tra la sonĝoj” (2010), “Sentokaoso” (2013), “En Esperantujo” (2014) kaj “Kukoj kun fromaĝo” (2017). Dum la koncerto en Havano, tre ŝatita de la ĉeestantoj, aŭskulteblis kanzonoj el ĉiu albumo. La plej nova produktaĵo enhavas ĉefe ukrainajn popolkantojn kiuj alproksimigas nin al la devenlando de Lena. Estis la tria fojo kiam ĴeLe kaj Geomar unuiĝis por kunludi. Nome de ĴeLe, Lena donacis ilian plej freŝan albumon al KEA kaj dankis al esperantistoj kiuj kunhelpis organizi la koncerton, samkiel al la estraro de la Asocio.

### Ruso-kuba familio en Havano

Delonge ni sciis pri Stano Belov kaj María Lisandra kaj nun pri ilia filo Leonid. María Lisandra dum multaj jaroj estis tre aktiva esperantistino en Guantánamo. Post ilia geedziĝo ili plu aktivadas en la Facebook-paĝo de KEA. Finfine ni havis la plezuron akcepti ilin en la Esperanto-Centro Havano. Vespere post LKK-kunsido ili renkontis estraranojn de KEA kaj aktivulojn, por neformala babilado. Rimarkindas la vizito de Leonid, denaska esperantisto kiu ankoraŭ parolas nek Esperanton, nek la rusan, nek la hispanan, sed kiu ofte aŭdas Esperanton el siaj gepatroj. Eĉ ni havis la ŝancon aŭdi lulkanton en Esperanto, kio estis tre agrabla sperto! Espereble ilia vizito ripetigis, almenaŭ María Lisandra, kiu loĝas en Havano de antaŭ iom da tempo volas pli aktive partopreni la vivon de nia Asocio; fakte ni havis la ŝancon renkonti ŝin denove en Baracoa kaze de la Zamenhofa Metiejo.



### KEA gastigis junan meksikaninon

Lastatempe eksterlandaj esperantistoj vizitadas nian sidejon. Ni havis la plezuron gastigi la junan meksikaninon Ana Fabiola, kiu vizitis nin kaj trankviliĝis dum unu tago ĉe KEA. Akceptis ŝin José Cárdenas Zúñiga, Ronald Sánchez Rodríguez kaj Javier Ramos Nistal, kiuj hazarde troviĝis en la E-Centro. Tie ni babilis, aŭskultis kuban E-muzikon (ŝi fakte konis kaj estis fano de la muziko de Julián), dancis, drinkis kaj amuziĝis dum la vespero ĝis iom malfrue en la nokto. Menciindas ke sekvaltage ŝi promenis tra la urbo kun aliaj esperantistoj, sed familiaj devoj ne ebligis al ŝi resti longe en Kubo, tiel ke ŝi frue revenis al Meksiko. Ŝi restis tiel ravita ke ŝi promesis venontfoje frue anonci sian viziton kaj ne plu improvizi. Pluraj fotoj estis publikigitaj en la Facebook-paĝo de KEA.



### Geedziĝo en la Esperanto-Centro Havano

Vere la amo kaj la internacia lingvo Esperanto havas fortajn kaj senlimajn rilatojn. En mardo, la 17-an de oktobro 2017, geedziĝis Daimi Doval Delsa kaj Miguel Ángel González Alfonso, tre aktivaj membroj de Kuba Esperanto-Asocio. Ili festis sian geedziĝan feston ĉe la korto de la Esperanto-Cen-



# Diversaj agadoj

tro Havano. La etoso estis tre familia, la ĉeestantoj tostis je la geedza paro, estis iom da trinkaĵoj kaj fine ĉiuj dancis. La amo kune kun Esperanto venkis kaj ili ĉiam iros antaŭen.

## Vizito el Santandero, Kantabrio, Hispanio

Novembre de 2017 unuafoje vizitis Kubon Carmen kaj María, du esperantistinoj el Santandero, Kantabrio, Hispanio, kiuj rondvojaĝis en Kubo, vizitis la havanan Esperanto-Centron kaj partoprenis tradician aranĝon de KEA tie. En Havano, ili ankaŭ vizitis la bienon “La Vigía”, kie loĝis la fama usona verkisto Ernest Hemingway. Carmen kaj María portis solidaran librodonacon nome de la E-Klubo de Santandero kaj restis tre kontentaj post la rondvojaĝo en Kubo.



## Esperanto kaj radioamatoroj

De la 13-a ĝis la 15-a de oktobro 2017 okazis regiona aranĝo de la Havana Filio de la Kuba Federacio de Radioamatoroj (FRC) en la kampadejo “Las Caletas” en Santa Cruz del Norte, provinco Mayabeque. La aranĝo taŭgis por ke pli ol 50 membroj de diversaj radioklubo de nia ĉefurbo interkonatiĝu kaj interŝanĝu spertojn por plibonigi sian laboron. Partoprenis el nia Speciala Radioklubo Esperanto: Rolando Madrigal Pérez (CO2L-CR), Yordán Fonseca Olivera (CM2YGO), Javier Ramos Nistal (CM2MM) kaj Fráncel Briel Gil (CL2FB). Ni prezentis niajn spertojn kaj rakontis pri Esperanto en nia fako kaj specife pri nia laboro dum la lastaj jaroj. Kiel parto de la programo ni informis pri niaj E-kursoj kaj invitis al ĉiuj partoprenantoj lerni la Internacian Lingvon Esperanto, alternativo por komunikiĝi, interkompreniĝi kaj uzi ĝin en radioamatorismo. La ideo estis bonvena kaj pluraj dankis pro la informoj ĉar oni ofte aŭdas pri nia radioklubo sed ne bone scias kion ni faras.



## Informkampanjo, ne nur en radio

La 9-an de novembro 2017 estis intervjuita Ariadna García Gutiérrez (zorganto pri Gazetara Servo de la 9-a TAKE) en “Mediodía en TV” de la nacia televidkanalo Cubavisión. Ŝi parolis pri la premio kiun ricevis en Ĉinio la kultura projekto Amindaj, el ContraMaestre. La premio estis al la Plej bona originala muziko en Esperanto, inter 77 konkurantaj filmetoj, krome ŝi parolis pri la 9-a TAKE, KEA kaj Esperanto. La ĉo de la intervjuo estis tre granda, KEA ricevis amason da telefonvokoj kaj informpetoj, pro kio oni eĉ okazigis novan kurson en la Esperanto-Centro Havano. Ŝi jam aperigis plurajn informojn en Radio Havano Kubo, Radio Reloj, Radio Rebelde, COCO, Prensa Latina, Canal Habana kaj Canal Caribe, estis intervjuita de Canal Habana kaj ŝi ankoraŭ daŭre laboras... tre bona agado kiu jam komencis doni rezultojn. Rimarkindas, ke post ŝia diplomiĝo kiel profesiulo pri Informado ŝi eklaboras en Radio Havano Kubo, do en la Nacia Instituto pri Radio kaj Televido, kiu prizorgas la disvastigon de informoj en la amaskomunikiloj.



Redaktis: Javier Ramos Nistal, Geomar Martínez Pérez kaj Yordán Fonseca Olivera



## INFORMILO n-ro 1 (ĝis 2018-03-31, CUP)

### MEMBROJ-SUBTENANTOJ 2018 (35)


★ **La Habana (27):** Alberto Fernández-Calienes Barrios, Alberto Rodríguez Pineda, Alina Cristina Miranda Busutil, Ángela Pedroso Cuesta, Daimi Doval Delsa, Digna Mayra Morales Burón, Elis Castro Peralta, Frank González González, Ismary Lezcano García, Javier Ramos Nistal, José Evelio Hernández Zúñiga, José Luis Hernández Carvajal, Juan Carlos Montero Medina, Luis Enrique Rizo García, Luis Humberto Padrón Luna, Magaly Molina Suárez, María Antonia Cartaya Martínez, Marta Eugenia Alonso Gutiérrez, Mercedes María Menas González, Miguel An-

gel González Alfonso, Noel González Fernández, Olga Lidia Barrios Cunningham, Pedro Fernández Rodríguez, Ramón García Tarragó, Sissy Kazerin Casas Garbey, Vilhelmo Lutermano, Yordán Fonseca Olivera. ★ **Villa Clara (2):** Noelys C. González Hernández, Yusimith Barrera Camacho. ★ **Ciego de Ávila (1):** Amparado Cisnero Rovira. ★ **Holguín (1):** Isnel Pupo Peña. ★ **Granma (4):** Anyer Rafael Montero Ramos, Flora Virgen Enamorado Rosales, Rafael Rodolfo Cabrera Espinosa, Ramón Adolfo Coronado Vázquez.

### DONACIOJ (7 676.00)

★ **Martí Klubo (2 515.00):** De 2017 (1 620.00), María A Cartaya Martínez (50.00), Orlando Raola (480.00), Pedro Fernández Rodríguez (100.00), Mirta María Guerra Echevarría (20.00), Ángela Pedroso Cuesta (150.00), Mercedes María Menas González (95.00). ★ **Fonduso Solidareco (1 298.00):** Daisy Baró Cisnero (25.00), Leonardo Luna Neyra (25.00), Vilhelmo Lutermano (1 248.00). ★ **Instruista Kaso (3 863.00):** De 2017 (2 932.00), Aŭkcio 9-a TAKE (781.00), Ángela Pedroso Cuesta (150.00).

*Al ĉiuj donacintoj KEA tre kore dankas.*



[www.uea.org](http://www.uea.org)

Universala Esperanto-Asocio (UEA) ligas Esperanto-parolantojn tra la tuta mondo. UEA organizas Esperanto-kongresojn, kunordigas landajn kaj fakajn asociojn en pli ol 120 landoj.

Ĝi eldonas librojn kaj gazetojn en Esperanto, subtenas kursojn kaj kulturajn eventojn. Kiel Ne-Registara Organizaĵo (NRO) ĝi partoprenas la agadojn de UN kaj Unesko kaj laboras por lingva justeco en la mondo.

**Fariĝu Individua Membro de UEA!**

Kuba Esperanto-Asocio  
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba  
+53 7 640 4484  
Info@esperanto.co.cu  
www.esperanto.cult.cu



### En 2019 KEA fariĝos 40-jaraĝa

Bona momento por mezuri niajn atingojn kaj pripensi la perspektivojn.

Vi, KEA-ano certe havas viajn proprajn ideojn pri tio!

**La estonteco de KEA dependas de ni ĉiuj.  
La Nacia Estraro atendas viajn opiniojn!**

1988-2018

**30-jariĝo de la Esperanto-Redakcio**

*Amika voĉo el Kubo,  
libera teritorio  
en Ameriko*

[www.radiohc.cu/eo](http://www.radiohc.cu/eo)

**RADIO HAVANO KUBO**

**Kurtondaj kaj retaj elsendoj en Esperanto  
Nun ankaŭ en FM!**



*esperanto.cu* estas trimonata bulteno por komitatoj, estraranoj kaj aktivuloj de KEA. PDF-versio elŝuteblas ĉe [www.esperanto.cult.cu](http://www.esperanto.cult.cu). **Kunredaktis:** Alberto Fernández-Calienes Barrios, Maritza Gutiérrez González kaj Juan Ramón Rodríguez Gómez. **Enpaĝigis:** Alberto Fernández-Calienes Barrios. **Kunlaboris:** Javier Ramos Nistal, Geomar Martínez Pérez kaj Yordán Fonseca Olivera.